

CARLO GOLDONI

KURIOZA
OKAZAJO

(UN CURIOSO ACCIDENTE)

TRIAKTA KOMEDIO

EL ITALA TRADUKIS "MEVO,"

1933

"L'ESPERANTO" - TORINO



CARLO GOLDONI

CARLO GOLDONI

KURIOZA
OKAZAJO

(UN CURIOSO ACCIDENTE)

TRIAKTA KOMEDIO



EL ITALA TRADUKIS "MEVO,"

1933

"L'ESPERANTO," - TORINO

S. E. T.
SOCIETÀ EDITRICE TORINESE
Corso Valdocco n. 2
TORINO

PAĜA TABELO

<i>Prononco de naciaj nomoj</i>	paĝo	6
<i>Carlo Goldoni</i>	”	7
<i>Personoj de la Komedio</i>	”	10
<i>Akto unua</i>	”	13
<i>Akto dua</i>	”	35
<i>Akto tria</i>	”	51
<i>Notoj pri kelkaj vortoj aŭ esprimoj</i>	”	63

PRONONCO DE NACIAJ NOMOJ

Arlecchino	Arlekkino
Bergamo	Bérgamo
Bologna	Bolonja
Bourru bienfaisant .	Burrù bienfezàn
Brighella	Brigella
Carlo	Karlo
Costanza	Kostanca
Curioso Accidente .	Kurjozo Aĉcidente
De la Coterie	De la Kotrì
Geltrude	Ĝeltrude
Giannina	Ĝannina
Guascogna	Guaskonja
Medebac	Medebàk
Ortensia	Ortensja
Poquelin de Molière	Poklèn de Molièr
Riccardo	Rikkardo
Venezia	Venecja
Voltaire	Voltèr

N. B. — Ne notitajn nomojn oni prononcas preskaŭ aŭ tute kiel en Esperanto.

CARLO GOLDONI

(1707 - 1793)

La granda dekoka jarcento, tiu giganta uzino de la novaj epokoj, tiu senmezura fandujo kie kunfluis kaj boladis ĉiuj kuraĝaj ideoj, kiam la intelekta elito arde atakis la nekona-ton kaj la kritiko leviĝis por fine mortvundi la kredon, vidis ankaŭ la belartojn celi novajn superajn formojn. El la malinda plebeco de krudaj rutinoj, en kiuj miksiĝis senhonta histrioneco de aktoroj-jonglistoj kun banala poezio, el la plena dekadenco sekvinta la momentan brilon de l' Renesanco, ankaŭ la teatra ludo leviĝis ree al la arta nivelo de la pramodeloj klasikaj: kaj tiu rekonduko de la komedio inter la literaturajn esprim-ojn estis en Italujo verko de Carlo Goldoni.

Regis tiam en la teatro tiu speco de vulgara spektaklo de mimoj kiu estis la komedio laŭ temo aŭ komedio de l'arto. La roluloj ricevis de aŭtoro nur la temon kaj ĝeneralan direk-ton, dividon de aktoj kaj scenoj; sed la dialogo kaj ĉiu detalo de l' prezento restis je plaĉo de la aktoro mem: kaj la plej multaj aktoroj, ne kapablante efektive improvizi, ripetis parkere kutimajn dialogojn. Havis ĉefan rolon en tiu teatraĵo la kvar "maskoj,, famaj: Pantalono, tipa nigrevestita komerc-isto de Venezia, kun pinta barbo, lana bireto, ruĝaj ŝtrumpoj; la Doktoro, vestita laŭ kostumo de la universitataj profesoroj de Bologna; Brigelo (Brighella) kaj Arlekeno (Arlecchino) el Bergamo, la unua, servisto ruza kaj trompema, vestita per livreo, la dua, servisto fuŝa, malsprita kaj naiva, kies vesto ŝajnis kunkudrita el diverskoloraj ĉifonoj.

Mankis al tiu ludo jam principe la unueco, kaj ĝi ne povis ne degeneri: ĝi fakte degeneris. Perdinte ĉian artan valoron, ĝi iĝis baldaŭ io meza inter farso sendeca kaj buda jonglado: nenia unueco, neniua signifo en la ago, nur la ridegoj de l' publiko ĉe la mimiko kaj la krudaj spritaĵoj de la kvar famaj "maskoj,,. Sed de Francujo estis veninta la ekzemplo. Tie, jam en la deksepa jarcento, J. B. Poquelin de Molière estis restariginta la bonan komedion de klasika gusto; kaj ne estis la dekoka jarcento tiu, kiu povis malatenti tian mode-

lon. Post kelkaj ŝatindaj provoj de duarangaj verkistoj, en la riĉa, prospera, gaja, luksa kaj dekadenca Venezia komencis labori la itala Molière.

Carlo Goldoni naskiĝis en la adriatika ĉefurbo la 25.an de februaro 1707. Post sia doktoriĝo kaj post mallonga oficista provo, li komencis vojaĝi tra Italujo kun trupo de aktoroj, verkante teatraĵojn. Momente li restadis en Pisa kiel profesia advokato; sed, ree trenata al la antaŭa vivo de sia potenca inklino, li kuniĝis al la trupo Medebac kaj kun ĝi vojaĝis verkante siajn plej belajn komediojn. Komence, li parte sekvis la guston de l' tempo: tuj poste, potence helpata de sia akuta observemo, de sia subtilega sento pri la ridindo, de sia trankvila kaj fortega karaktero, li ekvolis sola kaj sola plenumis unu el la plej grandaj reformoj de la arta evoluo. En 1748 li prezentis en Venezia "La ruza Vidvino", kiu neatende kaj brile triumfis. Ĝi estis la unua venko. La sekvintan jaron li estis de la trupestro devigata prezenti "La bonŝanca Heredantino", kiu fiaskis.

Tiam okazis tia memorinda fakto, kia neniam reaperis en la teatra historio. Goldoni, akre pikita de la publika malaprobo kaj pri si mem konscianta, anoncigis publike ke en la venonta jaro li verkos kaj prezentos dek ses novajn komediojn. Nesuperebla ekzemplo de fido pri si mem, pri siaj propraj fortoj kaj kapablo! Sed la fantazio de Goldoni estis tiom frukto-dona, ke li kreis dum sia vivo ja cent kvindek verkojn: tragediojn, melodramojn kaj komediojn. La promeson li plenumis: kaj, krom du, ĉiuj dek ses komedioj triumfis.

Unu el la plej ŝatataj el liaj ĉefverkoj, "Un curioso Accidente", estas nun tradukita en Esperanton kaj ĉi tie prezentata.

Envio, miskompreno, tradiciemo, artista ĵaluzo baldaŭ kreis al Goldoni multajn kaj akrajn malamikojn: inter ili meritas mencion Carlo Gozzi, verkisto kaj teatristo, kiu iĝis arda subtenanto de la komedio laŭ temo, kaj verkis por ĝi Fabelojn; el ĉi tiuj kelkaj meritas ŝaton, sed ili certe ne povis rezisti la komparon nek elteni la lukton.

Kiu volus trovi plej freŝan klarigon de tiu luktado de Goldoni kontraŭ la komedio de l'arto kaj la malnova gusto, devus legi la komedion de li mem, titolitan "La Teatro Komika".

En 1761 Goldoni iris Parizon, ĉe la italan teatron: pli poste, li estis guvernisto - instruisto de la reĝaj princinoj. En Parizo li daŭrigis la verkadon: i. a. li verkis en franca lingvo tiun "Le Bourru bienfaisant," ("La Severulo bonfarema,") kiu meritis la laŭdon de Voltaire. Post la falo de Ludoviko XVI.a li perdis la pension kiun la reĝo estis por li fiksinta; kiam la Konvencio eksciis pri lia mizero, ĝi ordonis ke oni pagu al li ree unu pension, sed la morto lin frapis antaŭ la alveno de l' dekreto, la matenon de la 8.a de januaro 1793.

La talento de Goldoni estis ĉefe observa: ĉiu detalo de liaj ĉefverkoj montras eksterordinaran kapablon pri kvazaŭ pentra bildo de la kutimoj, malvirtoj kaj moroj. El la tri formoj de la komedio klasika greka, la tria, tiu de Menandros, retroviĝas en Goldoni: la suspektema tiraneco de la venecia respubliko eĉ meze de la plej senbrida kaj feliĉa libereco de moroj, malpermesis al li la politikan kritikon, kaj lin detenadis ĉe la satirado de la popolaj, burĝaj kaj nobeletaj malfortaĵoj. Tamen, oni povas aserti ke Goldoni ne estis kritika pensulo nek kuraĝa kreanto de novaj ideoj: en plena dekoka jarcento, ŝajnas ke li ne estas tuŝata de la brulantaj problemoj, ĉirkaŭ kiuj febras la tuta intelekta vivo de la epoko; politiko kaj filozofio restas por li fremdaj, li restas eĉ religiema. Li estas nur artisto: sed lia tuta fibraro vibras de arto, por la arto li estas giganto, kaj al la teatro de ĉiuj epokoj kaj popoloj apartenas, ore gravurita, lia nomo.

Neniu kuracilo por serenigi la teditan spiriton, por gajigi kaj ripozi la animon, pli valoras ol la legado de unu el la plej belaj komedioj de Goldoni. Liaj verkoj ankaŭ en originalo ne atingis verdire perfektan stilon nek lingvan purecon: tial despli facile ili restas ĝueblaj sen troa perdo tra la Esperanto - traduko. Se tamen ne estas tute modela kaj belega la formo, restas plena la ĝuo devenanta de la perfekta ĉizo, per kiu figuroj kaj tipoj staras antaŭ ni kun viveco mirinda; kaj de la majstra lerteco per kiu la bildo, pli viva ol la vivo, al la homa spirito tra la arta verko revenas.

Torino, en majo 1932.

MEVO

PERSONOJ DE LA KOMEDIO

SINJORO FILIBERTO - riĉa nederlanda komercisto.

FRAŬLINO GIANNINA - lia filino.

SINJORO RICCARDO - financisto.

FRAŬLINO COSTANZA - lia filino.

SINJORO DE LA COTERIE - franca leŭtenanto.

MARIANNA - ĉambristino de fraŭlino Giannina.

SINJORO GUASCOGNA - ĉambristo de la leŭtenanto.

*Oni prezentas la scenon en Hago, en la hejmo de
sinjoro Filiberto.*

Ĉi tiun Esperanto - tradukon prezentis la unuan fojon en Torino, okaze de la XVII.a Nacia Kongreso de Esperanto, la 27.an de julio 1932, trupo de diletantoj - esperantistoj el Milano Ludis rolon:

S.ro Paolo Meazzi, reĝisoro (Sinjoro De la Coterie)

F.no Elda Massarani (Fraŭlino Giannina)

F.no Ada Massarani (Fraŭlino Costanza)

F.no Sara Parmeggiani (Marianna)

S.ro Felice Bertolotti (Sinjoro Filiberto)

S.ro Ermanno Vecchio (Sinjoro Riccardo)

S.ro Giannino Ferrari (Sinjoro Guascogna)

KURIOZA OKAZAJO

AKTO UNUA

SCENO UNUA

Ĉambro en la hejmo de Sinjoro Filiberto.

(GUASCOGNA, preparante la kofron de sia mastro, poste MARIANNA).

MAR. — Ĉu oni povas diri bonan tagon al sinjoro Guascogna?

GUAS. — Jes, aminda Marianna, de vi estas al mi kara la bona tago, sed estus al mi pli kara la bona nokto.

MAR. — Mi bedaŭras, laŭ mi vidas, ke mi devas deziri al vi la bonan vojaĝon.

GUAS. — Ha, kara mia ĝojo, post malgaja foriro povos okazi nur tre malfeliĉa vojaĝo.

MAR. — Ŝajnas ke vi bedaŭras foriri.

GUAS. — Ĉu vi dubas pri tio? Post ses monatoj de kiam mi ĝuas vian amindan kunestadon, ĉu mi povas foriri sen malespero?

MAR. — Kaj kiu vin devigas fari ion, kio malplaĉas al vi?

GUAS. — Ĉu vi ne scias? La mastro.

MAR. — Mastroj ne mankas en Hago, kaj ĉi tie sendube vi trovus iun, kiu donus pli multe al vi ol franca oficiro militkaptita, vundita kaj persekutita de l' sorto.

GUAS. — Kompatu min, simila diro ne indas je junulino kia vi. Jam de multaj jaroj mi havas la honoron servi mian mastron. Lia patro, mi povas diri, lin rekomendis al mi. Mi servis lin ĉe la milito. Mi ne evitis la danĝeron por pruvi al li mian fidelon. Li estas malriĉa, sed bonkora; mi estas certa ke kiam li progresos en sia kariero, mi men partoprenos ĉiun lian profiton, kaj vi min konsilus lin forlasi kaj konsenti ke li revenu Francujon sen mi?

MAR. — Vi parolas kiel saĝa homo, kia vi estas, sed mi ne povas kaŝi mian pasion.

GUAS. — Kara Marianna, mi estas malĝoja kiel vi. Sed mi esperas vin revidi kaj esti en plibona stato kaj povi al vi diri: jen mi, mi povas vin subteni, kaj mi estas via, se vi min volas.

MAR. — Volu la ĉielo! Sed kial sinjoro leŭtenanto volas tiel frue forveturi? Mia mastro lin vidas tre volonte, kaj mi opinias ke lia filino lin vidas ne malpli volonte ol la patro.

GUAS. — Bedaŭrinde jes, kaj jen la kialo pro kiu li foriras.

MAR. — Ĉu ĝenas al li esti bone akceptata?

GUAS. — Ha, Marianna mia, mia mastro enamiĝis je via mastrino ĝis perdiĝo! Li vivadas la plej mizeran vivon de tiu ĉi mondo. Li komprenas ke pli kaj pli tiu reciproka amo grandiĝas, kaj, ne povante plu ĝin kaŝi, li timas por si mem kaj por fraŭlino Giannina. Via mastro estas tre riĉa, kaj la mia tre malriĉa. Sinjoro Filiberto, kiu havas nur tiun ĉi filinon, ne volus ŝin doni al kadeto, al soldato, al iu fine kiu devus vivadi per la doto. La leŭtenanto estas malriĉa, sed honesta. Li respektas la gastecon, la amikecon, la sincerecon. Li timas ke amo lin blindigos, li dubas ke li estos delogita aŭ estos en neceso delogi. Pro tio, sin mem perfortante, li oferas sian koron al sia honesteco, kaj tute firme decidis foriri.

MAR. — Mi laŭdas la belan heroaĵon. Sed, se tio dependus de mi, mi ne kapablus lin helpi.

GUAS. — Tamen oni devas sin fortigi.

MAR. — Vi ĝin faros pli facile ol mi.

GUAS. — Vere, ni viroj havas koron pli fortika.

MAR. — Ho ne, diru prefere ke via amemo estas pli malforta.

GUAS. — koncerne min, vi misjuĝas, se vi tiel opinias.

MAR. — Mi kredas faktojn, ne vortojn.

GUAS. — Kion mi devus fari por vin certigi pri mia amo?

MAR. — Sinjoro Guascogna ne bezonas mian sugeston.

GUAS. — Ĉu vi volus ke antaŭ mia foriro mi edziĝu kun vi?

MAR. — Tiu ĉi estus ja fakto ne dubinda.

GUAS. — Sed poste necesus ke ni disiĝu.

MAR. — Kaj vi kapablus min forlasi?

GUAS. — Aŭ ke vi venu kune.

MAR. — Prefere.

GUAS. — Sed por malbone stati?

MAR. — Tio ĝenas min, verdire.

GUAS. — Se ni restus ĉi tie, ĉu vi ŝatus?

MAR. — Tre multe.

GUAS. — Por kiom da tempo?

MAR. — Nu, almenaŭ unu jaron.

GUAS. — Kaj, post unu jaro, ĉu vi lasus min foriri?

MAR. — Post unu jaro da edzeco oni povus faciligi.

GUAS. — Mi dubas ke vi lasus min foriri post unu monato.

MAR. — Mi ne opinias.

GUAS. — Mi estas certa.

MAR. — Ni tion provu.

GUAS. — Venas la mastro. Ni preparolos kun pli da libero.

MAR. — Ha, sinjoro Guascogna, la ĵusa dialogo min tute faligis. Ĉiel klopodu Mi rekomendas (Vere, mi ne scias kion mi diras.) (*ŝi foriras*).

SCENO DUA

(*GUASCOGNA, poste SINJORO DE LA COTERIE*).

GUAS. — Se mi ne estus pli prudenta ol ŝi, la fuŝaĵo estus farita.

COT. — (Ho ĉielo! mi estas ja malfeliĉa! mi estas ja malbonŝanca!)

GUAS. — Sinjoro, la kofro estos tuj preta.

COT. — Ha! Guascogna, mi malesperas.

GUAS. — Ho ve! Kia malbono vin trafis?

COT. — La plej granda malbono kiu povis okazi.

GUAS. — La malfeliĉoj neniam alvenas unuope.

COT. — Mia malfeliĉo estas nur unu, sed ĝi estas tiom granda, ke mia koro ne povas ĝin elteni.

GUAS. — Mi supozas ke vi ĝin ŝuldas al via amo.

COT. — Jes, sed ĝi grandiĝis tiamaniere, ke nenia forto sufiĉas ĝin superi.

GUAS. — Ĉu jes, ke via bela amatino estas indiferenta pri via foriro kaj ne amas vin kiom vi supozis esti amata?

COT. — Kontraŭe. Neniam pli milda, neniam pli amema. Ho Dio! Aŭskultu ĝis kie atingas mia malespero. Mi vidis ŝin plori.

GUAS. — Ho! malbonaĵo: sed mi supozis pli grandan malfeliĉon.

COT. — Nehumana! malsaĝa! aŭ plibone, malnobla animo!

plebano! ĉu vi povas imagi ion pli malbonan en la mondo, ol la larmojn de milda aflikta virino, kiu riproĉas al mi mian kruelon, senfortigas mian firmecon, kiu endanĝerigas mian honoron, mian honestecon, mian fidon?

GUAS. — Mi ne opiniis meriti tiel insultajn riproĉojn. Post dek jaroj, mia servado estas ja tre bone rekompencata.

COT. — Ha! Vestu vin per miaj tukoj kaj kondamnu, se vi povas, mian pasion. Miaj vundoj, mia sango, mia milita malliberado, kiu malhelpas al mi la karieron, la nesufiĉo de mia havaĵo, ĉio ŝajnis al mi malgravaĵo kompare kun beleco, kiu min enamigis, kiu min ekflamigis. La bona moro de la knabino neniam konsentis al mi certigon pri la tuta posedo de ŝia koro, kaj ebligis al mi la grandaniman intencon ŝin forlasi. Ha! ĉe l' momento de l' disiĝo, la larmoj kaj singultoj kiuj haltigis al ŝi inter la lipoj la lastan saluton min certigis esti tiom amata kiom mi ŝin amas, kaj mia doloro estas ekstrema, kaj mia decido ŝajnas al mi kruela, kaj en la amo mi perdiĝas, kaj la prudento min forlasas.

GUAS. — Prokrastu, sinjoro. El ĉi tie oni ne vin forpelas. Sinjoro Filiberto estas la plej bona honestulo de tiu ĉi mondo. La gastamo en Nederlando estas plej tipa virto de la nacio, kaj ĉi tiu estiminda homo estas tre zorgema por vi, kaj pri via sano. Ne ankoraŭ perfekte vi resaniĝis, kaj jen prava preteksto por daŭrigi vian restadon.

COT. — Pripensu bone vian konsilon, nur iom sufiĉas por min decidigi.

GUAS. — (*li komencas malplenigi*) Koncerne miĝi, laŭ via bona permeso, mi ne hezitas malplenigi la kofron.

COT. — (Kion ili diros pri mi, se, petinte forpermeson, mi restos?)

GUAS. — (*malplenigante*) (Marianna ne devus esti pri tio malkontenta.)

COT. — (Jes, se mi devas ŝajnigi malfortan sanon, mia malĝojo donas al mi la motivon.)

GUAS. — (Verdire, ĉi tiu prokrasto ne malplaĉas ankaŭ al mi.)

COT. — (Ha! ne; ju pli mi malfruas, des pli la flamo grandiĝas. Kaj kia helpo al brulado? Kia flato al senespera mia amo?)

GUAS. — (Ho! la tempo ĝustigas multajn aferojn!)

COT. — (He, mi renkontu nur unu morton, por ne multobligi la turmentojn.)

GUAS. — (La mastro estos al mi dankema.)

- COT. — Kion vi faras ?
- GUAS. — Mi malplenigas la kofron.
- COT. — Kiu vin diris tion fari ?
- GUAS. — Mi ĝin diris, kaj vi ne kontraŭis.
- COT. — Stulta ! Remetu la vestojn. Mi volas foriri.
- GUAS. — Kaj pro kio vi lasis min fari ĝis nun ?
- COT. — Ne spitu mian paciencon !
- GUAS. — Mi ĝin repretigos vespere.
- COT. — Rapidu tuj, kaj klopodu ke antaŭ tagmezo la kurierĉevaloj estu ĉi tie.
- GUAS. — Kaj la larmojn de la fraŭlino ?
- COT. — Malinda ! vi havas koron min turmenti ?
- GUAS. — Kompatinda mastro mia !
- COT. — (*kviete*) Jes, kompatu min, ĉar mi ĝin ja meritas.
- GUAS. — (*kviete*) Ĉu ni lasu ?
- COT. — (*malĝoje*) Ne.
- GUAS. — (*kviete*) Ĉu mi enmetu do ?
- COT. — (*malĝoje*) Jes.
- GUAS. — (*remetante en la kofron*) (Li kompatindas vere.)
- COT. — (Ho, se mi povus foriri ne ŝin revidinte !)
- GUAS. — (Sed ja mi timas ke ĉi tie ne finiĝos la scenoj)
- COT. — (Tion malkonsentas konveno, kaj mi dubas ke tion malkonsentos mia amo.)
- GUAS. — (*rigardante tra la kulisoj*) (Ve, malfeliĉa mastro ! Ve ! Kion mi vidas !)
- COT. — Kion vi faras ? Kial vi ne daŭrigas ?
- GUAS. — (*konfuza*) He, mi daŭrigas, jes, sinjoro.
- COT. — Ĉu vi estas konfuza ?
- GUAS. — Iom.
- COT. — Kion vi vidas ?
- GUAS. — Nenion.
- COT. — Ho ĉieloj ! Fraŭlino Giannina ? Kia renkonto estas ĉi tiu ? Kion vi min konsilas fari ?
- GUAS. — Mi ne scius. Ĉia konsilo estas danĝera.
- COT. — Ne forlasu min !
- GUAS. — Mi ne foriras.
- COT. — Mi foriros.
- GUAS. — Ĉio laŭ via plaĉo.
- COT. — Mi ne povas.
- GUAS. — Mi vin kompatas.

COT. — Kial ŝi haltas? Kial ŝi ne venas?

GUAS. — Eble ŝi timas vin kolerigi.

COT. — Ne, eble ŝi hezitas pro vi.

GUAS. — (*ekforirante*) Surmomente mi forigas la ĝenon.

COT. — Haltu!

GUAS. — Mi restas.

COT. — Ĉu vi havas tabakon?

GUAS. — Mi ne havas da ĝi, sinjoro.

COT. — Malsaĝa! eĉ ne tabakon?

GUAS. — Mi kuras preni la tabakujon (*li foriras kurante*).

SCENO TRIA

(*SINJORO DE LA COTERIE, poste FRAŬLINO GIANNINA*).

COT. — Aŭskultu. Kien vi iras? Mi malfeliĉa! Guascogna?

GIA. — Ĉu vi bezonas ion?

COT. — Kompatu min. Mi bezonas mian serviston.

GIA. — Se la via forestas, aliaj estos. Ĉu vi volas iun?

COT. — Ne, mi vin dankas. Necesas la mia por finplenigi mian kofron.

GIA. — Kaj vi malkvietiĝas tiagrade pro la urĝo elfini tiom gravan laboron? Ĉu vi timas ke la tempo mankos al vi? Ĉu la kuriero vin atendas? Se la aero de ĉi tiu ĉielo ne taŭgas plu por via sano, aŭ, por plibone diri, se la restado en tiu ĉi hejmo vin enuigas, jen mi mem preta vin servi por rapidigi vian foriron.

COT. — Fraŭlino, havu kompaton. Ne ĉagrenu min plie.

GIA. — Se mi scius de kio devenas via ĉagreno, mi ĝin klopodus, anstataŭ kreskigi, mildigi.

COT. — Serĉu ties kaŭzon en vi mem, kaj vi ne bezonos ke mi ĝin diru.

GIA. — Ĉu vi do foriras pro mi?

COT. — Jes, pro vi mi estas devigata rapidigi mian foriron.

GIA. — Tiom malaminda mi iĝis do je via vido?

COT. — Ho ĉieloj! Neniam tiom aminda vi aperis al mi. Neniam pli dolĉe vundis min via rigardo.

GIA. — Ha! Se tio estus vera, mi ne vin vidus tiel urĝema foriri.

COT. — Se mi amus nur la belecon de via vizaĝo, mi cedus al la fortega amo kiu min instigas restadi. Mi amas vian virton,

mi vidas en danĝero vian kvieton, kaj mi intencas rekompenci la bonecon kiun vi montras al mi, oferante la plej belajn esperojn de mia amo.

GIA. — Mi ne kredas vin tiel malsprita, ke vi ne povas superi kian ajn pasion, kaj vi ofendas mian virton se vi opinias min nekapabla rezisti la inklinojn de l' koro. Mi vin amis ĝis nun ne hontante pri mia amo. Ŝajnas al mi ke dum la tuta daŭro de mia vivo mi povus min kompromiti per *tia* virta amo, kaj mi ne sukcesas min konvinki ke viro estus malpli kapabla ol mi elteni glorie la internan batalon de la pasioj. Mi povas vin ami sen danĝero. Mi deziregus vin vidi por mia konsolo. Vi, male, volante foriri perforte, celas pli feliĉan trankvilon, montrante, pli ol amon, malsuferemon. Mi aŭdis ke espero estas konsolo de l' deziranto. Kiu deturniĝas de la rimedoj, tiu pruvas ke li malmulte zorgas la celon, kaj vi, rifuzante suferi la turmentan malkvietecon de la esperado, montras aŭ malŝatindan malforton, aŭ insultan malvarmon. Kia ajn estas la stimulo vin spronanta foriri, iru libere fiera pri via sendanka triumfo, sed hontu pri senkompara kruelo.

COT. — Ha! ne, fraŭlino; ne kulpigu min pri maldankeco, ne ĵetu sur min la kruelon. Mi opiniis vin servi forirante; se mi trompiĝis, pardonu; se vi ordonas, mi restos.

GIA. — Ne, neniam okazos ke mia ordono vin perfortas; sekvu la sugeston de via koro.

COT. — La koro min diras ke mi restu.

GIA. — Ĝin obeu sen timo; kaj se la kuraĝo ne vin forlasos, estu certa pri mia konstanto.

COT. — Kion diros via patro pri mia pensoŝanĝo?

GIA. — Li estis pri via foriro tiel malkontenta kiel mi. Li ne estas kontenta pri via sano; kaj vere, ĉu pro via danĝera vundo, ĉu pro ia ĉagreno de via animo, la kuracistoj ne opinias vin resaniĝinta, kaj ŝajnas al mia patro antaŭtempa la vojaĝo kiun vi ekkomencas. Li vin amas kaj estimas, kaj li estos tre kontenta se vi restos.

COT. — Ĉu neniam li ekvidis ke mi sentas inklinon al vi, kaj ke vi ankaŭ al mi inklinas?

GIA. — Nia konduto ne konsentis al li suspekton.

COT. — Ĉu eble ke neniam li ekpensis ke libera homo, ke militisto, povas ekflamiĝi pri beleco kaj merito de la filino?

GIA. — Homo kun tia karaktero kiel mia patro facile konvinkiĝas pri la honesteco de la aliaj. La malfermita koro kun kiu

li vin akceptis en sia hejmo, lin certigas pri la tuta fido de honorinda oficiro, kaj la kono pri mia moro lin tenas en trankvilega kvieto. Li trompiĝis nek pri vi nek pri mi. Naskiĝis en niaj koroj la dolĉa flamo, sed de ni estas respektata la virto, kaj ne estas perfidata lia kredo.

COT. — Kaj ne estas espereble ke lia boneco por mi agos ĝis konsento pri nia geedziĝo?

GIA. — Jen tio, kion mi kuraĝas esperi de l' tempo. La malfacilaĵoj ne dependas de l' monhavaĵo, sed de certa ligo al la nacia moro. Se vi estus nederlanda komercisto malriĉa, sed kun bonetaj esperoj pri la estonteco, vi nun estus ricevinta ne nur mian manon, sed cent milojn da guldenoj por krei al vi mem bonan situacion. La edziniĝon kun oficiro, lasta ido de sia familio, oni konsideras ĉe ni malbonega edziniĝo, kaj se mia patro inklinus mem tion konsenti, lin tre forte ĝenus parencoj, amikoj kaj la nacia moro mem.

COT. — Sed mi ne povas esperi plibonigi mian situacion.

GIA. — La tempo povos doni favorajn cirkonstancojn por ni.

COT. — Ĉu vi metas inter ili la morton de via patro?

GIA. — La ĉielo tenu ĝin malproksima; sed en tiu okazo mi estus mastrino pri mi mem.

COT. — Kaj vi volas ke mi restu ĉe li ĝis lia morto?

GIA. — Ne, kara leŭtenanto, restu ĉi tie ĝis la deco permesos, sed ne vin montru deziranta foriri kiam vi havas bonajn motivojn por resti. Mi ne esperas mian feliĉon nur de la morto de mia patro, sed mi havas motivon fidi pri lia amo. Tiun amon konvenas kulturi, kaj ĉiu laboro postulas tempon.

COT. — Adorata Giannina, kiom mi ŝuldas al via boneco! Disponu pri mi, vi havas plenan liberon. Mi ne foriros, se vi mem ne diros ke mi foriru. Konvinku vi la patron min toleri, kaj estu certa ke nenia situacio en la mondo povus esti al mi pli favora kaj pli agrabla.

GIA. — Pri nur unu afero mi volus vin peti.

COT. — Ĉu vi ne povas min ordoni?

GIA. — Kompatu mian mankon, ne strangan en kiu amas. Mi vin petegas ne doni al mi motivon pri ĵaluzo.

COT. — Ĉu estus iam eble ke mi falus en tian malzorgaĵon?

GIA. — Mi ŝi diros: fraŭlino Costanza vizitas pli ofte ol kutime de post kelkaj tagoj nian hejmon. Ŝi vin rigardas tre favore, kaj kompatas vin iom tro multe. Vi estas pro kutimo ĝentila, kaj mi, kelkfoje, mi konfesas la veron, suferas de tio.

COT. — Mi zorgos en estonteco plej rigore, por ke ŝi ne sin flatu, kaj vi vivadu kontenta.

GIA. — Sed konduitu tiel, ke nek mia ĵaluzo, nek mia amo por vi evidentiĝu.

COT. — Ha! Volu la ĉielo, fraŭlino, ke ni eliru iun tagon el ĉagreno.

GIA. — Necesas suferi por meriti la donacojn de l' sorto.

COT. — Jes, kara, mi ĉion suferos por tiel feliĉa espero. Permesu ke mi serĉu mian serviston kaj lin sendu haltigi la mendon ĉe la poŝto.

GIA. — Ĉu jam menditaj estas la ĉevaloj?

COT. — Jes, certe.

GIA. — Sendanka!

COT. — Kompatu min.....

GIA. — Iru tuj, antaŭ ol mia patro ĝin ekscios.

COT. — Ho, mia espero! Ho, mia konsolo! La ĉielo favoru nian deziron, kaj al ni donu la premion de l' vera amo kaj de l' virta konstanto (*li foriras*).

SCENO KVARA

(*FRAŬLINO GIANNINA, poste SINJORO FILIBERTO*).

GIA — Neniam mi estus supozinta ke mi devos submetiĝi al tia faro. Mi mem uzi vortojn kaj rimedojn por lin restigi! Sed sen tio li post momento forveturus, kaj mi mortus iom post lia foriro. — Jen mia patro. Mi bedaŭras ke li min trovas en la ĉambroj de la fremdulo. Dank' al ĉielo li jam foriris. Konvenas dispeli el la mieno ĉian montron de malĝojo.

FIL. — Filino, kion vi faras en ĉi tiuj ĉambroj?

GIA. — Sinjoro, scivolo min puŝis.

FIL. — Kaj pri kio vi estas scivola?

GIA. — Vidi sentaŭgan mastron kaj fuŝpetolan serviston pretigi tre malbone unu kofron.

FIL. — Ĉu vi scias kiam li foriros?

GIA. — Li intencis foriri ĉi - matene; sed, dum li paŝis tra la ĉambro, li tiel malbone sin tenis sur la kruroj, ke li ektimis ne elteni la vojaĝon.

FIL. — Mi dubas ke la malsano je kiu li nun suferas estas kaŭzata de alia vundo iom pli penetranta.

GIA. — Ĝis nun la kuracistoj trovis ĉe li nur unu vundon.

FIL. — Ho! ekzistas vundoj kiujn la kuracistoj ne konas.

GIA. — Kia ajn frapo, kvankam malgrava, faras ekstere sian signon.

FIL. — He, ne, estas armiloj kiuj vundas tra la interno.

GIA. — Ĉu ne ŝirinte la haŭton?

FIL. — Certe.

GIA. — Kie trairas tiaj frapoj?

FIL. — Tra la pupiloj, tra la oreloj, tra la korpaj malplenoj.

GIA. — Ĉu vi intencas paroli pri la impresoj de aero?

FIL. — Ne, mi intencas paroli pri tiuj de l' fajro.

GIA. — Vere, sinjoro, mi ne vin komprenas.

FIL. — Mi ŝatus ke vi ne min komprenas.

GIA. — Ĉu vi min opinias malica?

FIL. — Ne, mi vin opinias bona knabino, saĝa, prudenta, kiu konas la malsanon de la oficiro, kaj ŝajnigas ĝin ne koni pro honesteco.

GIA. — (Mi malfeliĉa! Tiu lia maniero paroli min metas en maltrankvilon.)

FIL. — Giannina, al mi ŝajnas, ke vi iomete ruĝiĝis.

GIA. — Sinjoro, vi diras aferojn kiuj devige min ruĝigas. Nun mi ekkomprenas la misterajn vundojn pri kiuj vi parolis. Kiel ajn ĝi estu, mi konas nek lian malsanon, nek ĝian rimedon.

FIL. — Filino mia, ni venu al klara parolo. Sinjoro de la Coterie estis jam preskaŭ plene resaniĝinta unu monaton post lia alveno ĉi tien. Bone li fartis, bone li manĝis, li komencis reakiri siajn fortojn, havis belan koloron, kaj estis la plezuro de mia tablo kaj de nia konversacio. Iom post iom li komencis iĝi malgaja, perdis la apetiton, paliĝis, kaj liaj ŝerchumoraĵoj aliiĝis je vespiroj. Mi estas iom filozofo. Lian malsanon mi opinias pli de la spirito ol de la korpo, kaj por vin paroli eĉ pli klare, mi juĝas lin enamiĝinta.

GIA. — Eble la afero estas kiel vi diras; sed mi pensas ke, se li estus ĉi tie enamiĝinta, li ne klopodus foriri.

FIL. — Ho! ankaŭ pri tio, filozofio liveras bonajn pravigojn. Se eble, pro hazardo, tiu virino kiu lin enamigis estus riĉa, dependus de la patro, kaj ne povus konsenti al li ian bonan esperon, ne estus ekster temo ke malespero lin konsilas foriri.

GIA. — (Ŝajnas ke li ĉion scias.)

FIL. — Kaj la ekstremo de kruroj kiu lin subite survenis iom antaŭ foriro, diras mi, filozofie parolante, ĉu ne povus deveni de l' batalado inter la du kontraŭaj pasioj?

GIA. — (Preskaŭ mi malbenus la filozofion.)

FIL. — Ĝis nun min instigas lin helpi la simpatio kiun mi sentas al li, la gastamo al kiu volonte mi inklinas, kaj la humaneco mem kiu min igas zorgema por la bono de l' najbaro; sed mi ne volus ke kun lia malsano estu kunmiksita tiu de mia filino.

GIA. — Ho! jes, nun vi min vere ridigas. Ĉu ŝajnas al vi ke mi estas konsumita, pala, larmetanta? Kion diras via filozofio pri la eksteraj signoj de mia vizaĝo kaj de mia ridemo?

FIL. — Ĝi tenas min inter du juĝoj hezita. Aŭ ke vi havis la virton rezisti, aŭ ke vi havas tiun de l' ŝajnigo.

GIA. — Sinjoro, ĉu vi iam povis konstati ke mi estas mensogema?

FIL. — Ne, neniam mi tion konstatis, kaj pro tio mi ne dubas.

GIA. — Ke vi decidis en vi mem ke la oficiro estas enamiĝinta, tio bone iras kaj povas esti; sed mi ne estas la sola sur kiun povas fali la suspekto pri lia flamiĝo.

FIL. — Ĉar sinjoro leŭtenanto eliras tre malmulte el la hejmo, estas laŭ racie suspekti ke ĉi tie lia malsano naskiĝis.

GIA. — Fremdaj belulinoj venadas ĉi tien, kiuj povus esti lin flamigintaj.

FIL. — Ankaŭ ĉi tio povus esti; kaj vi, konante la societon kaj ne mankante je sprito kaj je kompreno, devus ĝin scii precize; kaj ĝin sciante, saĝe vi agus min eltirante el suspekto.

GIA. — Verdire mi promesis ne paroli.

FIL. — La patron oni devas escepti el similaj promesoj.

GIA. — Jes, certe, precipe kiam per silento mi riskas kaŭzi al li bedaŭron.

FIL. — Nu, do, bona filino, parolu. (Mi min devigis suspekti pri ŝi kun peno.)

GIA. — (Mi opinias mian elturniĝon neevitebla.) Sciu, sinjoro, ke la kompatinda sinjoro de la Coterie brulas kaj deliras pro fraŭlino Costanza.

FIL. — Tiu, kiu estas filino de sinjoro Riccardo?

GIA. — Jes, tiu precize.

FIL. — Ĉu same sentas al li la junino?

GIA. — Kun la plej granda varmo de tiu ĉi mondo.

FIL. — Kaj kiaj malfacilaĵoj kontraŭas la honestan celon de ilia amo ?

GIA. — Mi opinias ke la patro de la knabino ne konsentas ŝin doni al oficiro havanta apenaŭ rimedon ŝin subteni.

FIL. — Ja, bela fantaziaĵo ! Kaj kiu estas sinjoro Riccardo por permesi al si mem maksimumojn tiel rigorajn ? Li estas fine nur financisto, suprenlevita el la koto kaj riĉigita je l' sono de veplendoj popolaj. Ĉu li volus sin meti en rangon kun la nederlandaj komercistoj ? Edziniĝo kun oficiro honorus lian filinon, kaj li estus neniel elspezonta plibone sian monon malbone akiritan.

GIA. — Laŭ mi aŭdas, se vi estus la financisto ne rifuzus al li vian filinon ?

FIL. — Ne, certe.

GIA. — Sed, estante nederlanda komercisto, ne taŭgus por vi la elekto.

FIL. — Ne, ĝi ne taŭgus. Vi tion scias, por mi ĝi ne taŭgus.

GIA. — Pensis ankaŭ mi laŭ sama maniero.

FIL. — Mi volas zorgi favore al sinjoro de la Coterie.

GIA. — Kiamaniere, sinjoro ?

FIL. — Konvinkante sinjoron Riccardo ne rifuzi al li sian filinon.

GIA. — Mi ne konsilas tamen ke vi tiel enmiksiĝu en tian aferon.

FIL. — Ni aŭdu kion diras la leŭtenanto.

GIA. — Jes, lin aŭdu. (Necesas ke mi lin avizu.)

FIL. — Mi ne opinias ke li insistos forveturi senprokaste.

GIA. — Tamen mi scias ke li mendis la poŝton.

FIL. — Ni sendu tuj iun vidi.

GIA. — Mi mem iros, sinjoro. (Mi ne volus, por bone fari, esti fuŝinta la aferon.) (*ŝi foriras*).

SCENO KVINA

(*SINJORO FILIBERTO sola*).

FIL. — Vere, mi opiniis misjuĝi mian filinon dubante pri ŝi. Mi ŝatas ke eĉ plie mi certiĝis pri ŝia boneco. Vere estas, ke inter ŝiaj vortoj povus kaŝiĝi mensogo ; sed mi ne povas ŝin kredi tiel artifika. Ŝi estas filino de patro kiu amas la veron, kiu ne



La geaktoroj dum la unua prezentado de la komedio.

kapablas ŝajnigi eĉ nur pro ŝerco. Ĉiuj detaloj kiujn ŝi diris estas tre saĝaj. Tre eble la oficiro ekflamiĝis pri fraŭlino Costanza. Ŝia patro, tiu fierulaĉo, ne opinios lin bofilo sufiĉe inda por kontentigi sian vantecon; kaj mi, laŭ mia povo, volas esti svatisto de ĉi tiu geedziĝo. Ĉe unu flanko iom da nobeleco senŝanca; ĉe la alia iom da hazarda riĉeco, min ŝajnas ke ili inter si egalpezas, kaj ke ĉiu devos trovi sian utilon.

SCENO SESA

(*MARIANNA kaj la dirita*).

MAR. — Sinjoro, ĉu la mastrino jam ne estas tie ĉi?

FIL. — Ne, ŝi eliris antaŭ momento.

MAR. — (*ekforirante*) Laŭ via permeso.

FIL. — Kien vi iras tiel urĝe?

MAR. — Retrovi la mastrinon.

FIL. — Ĉu vi havas ion urĝan por ŝin diri?

MAR. — Estas sinjorino kiu petas pri ŝi.

FIL. — Kaj kiu ŝi estas?

MAR. — Fraŭlino Costanza.

FIL. — Ho! Estas tie fraŭlino Costanza?

MAR. — Jes, sinjoro, kaj mi opinias, ŝin vidante je ĉi tiu nekutima horo, ke io eksterordinara ŝin pelas.

FIL. — (*ridante*) He! Mi konas la eksterordinaran motivon. Diru al fraŭlino Costanza ke antaŭ ol eniri ĉe mian filinon, bonvolu, se tio al ŝi plaĉas, veni ĉi tien.

MAR. — Vi estos servita.

FIL. — Hej! La oficiro, ĉu estas hejme?

MAR. — Ne, sinjoro, li foriris.

FIL. — Tuj kiam li venos sendu lin ĉe min.

MAR. — Jes, sinjoro. Ĉu vi opinias ke foriros hodiaŭ la leŭtenanto?

FIL. — Mi havas konvinkon ke ne.

MAR. — Kaj fakte li havas tiom malfortan sanon ke li sin ruinigus se li sin metus en vojaĝon.

FIL. — Li restos. Li resaniĝos.

MAR. — Spite ĉion, kion oni diris al li, nepre li volas iri al sinofero.

FIL. — Li ne iros. Li restos, restos kaj resaniĝos.

MAR. — Kara sinjoro mastro, vi sola povus doni al li la sanon.

FIL. — Mi, he! Ankaŭ vi konas la malsanon de la leŭtenanto?

MAR. — Mi ĝin konas; kaj vi, sinjoro, ĉu vi ĝin konas?

FIL. — Mi scias ĉion.

MAR. — Kiu al vi ĝin diris?

FIL. — Mia filino.

MAR. — (*mirante*) Ĉu vere!

FIL. — Kia miro estas la via? Ĉu la filino ne devas konfidi la veron al sia patro?

MAR. — Kontraŭe, ŝi agis tre bone.

FIL. — Tiel oni povas rimedi.

MAR. — Finfine ĝi estas honesta amo.

FIL. — Tre honesta.

MAR. — La leŭtenanto estas edukita persono.

FIL. — Tre bone edukita.

MAR. — La nura malbono, ke li ne estas riĉa.

FIL. — Patro kiu havas en la mondo nur ĉi tiun knabinon, trovante la eblon ŝin edzinigi konvene, ne povas rifuzi ŝin kontentigi.

MAR. — Estu benata! Jen maksimumoj vere indaj de tia saĝa homo, kia vi estas. Mi estas tre konsolata kaj pro la fraŭlo kaj pro la knabino. (Sed multe pli pro mi mem, se kun mi restos mia adorata Guascogna.) (*ŝi foriras*).

SCENO SEPA

(*SINJORO FILIBERTO, poste FRAŬLINO COSTANZA*).

FIL. — La bonaj agoj povas esti nur laŭdataj, kaj ĉiu persono havanta iom da prudento, ilin komprenas kaj aprobas.

COS. — Sinjoro, mi estas je via ordono.

FIL. — Ho, fraŭlino Costanza, mi vin vidas tre volonte.

COS. — Pro via boneco.

FIL. — Plaĉas al mi ke vi estas amika al mia filino.

COS. — Ŝi multon meritas, kaj mi ŝin amas per la tuta koro.

FIL. — Ho, ne diru per la tuta koro, ne konvenas diri mensogojn.

COS. — Ĉu vi kredas ke mi ne amas ŝin sincere?

FIL. — Sincere, mi kredas, sed per la tuta koro, mi ne kredas.

COS. — De kio vi devenigas tian dubon?

FIL. — Ĉar se vi amus mian filinon per la tuta koro, ne restus al vi koro por aliaj.

COS. — Vi min ridigas. Al kiu mi devas ĝin partigi?

FIL. — Ruzeta! Ni nin komprenis.

COS. — Vere, mi vin ne komprenas.

FIL. — He, ĉesu! Ni metu ĝian moŝton la modestecon flanken, kaj bonvolu veni antaŭen ĝia moŝto la sincereco.

COS. — (Mi ne scias kien celas simila babilado.)

FIL. — Hej, diru: ĉu vi nun venis por viziti mian filinon?

COS. — Jes, sinjoro.

FIL. — Ne, sinjorino.

COS. — Kaj kial do?

FIL. — Sciu, fraŭlino, ke mi estas astrologo; mi havas koboldon kiu min diras ĉion, kaj la koboldo diras al mi en la jena momento: fraŭlino Costanza ne venis por viziti tiun, kiu restas, sed por komplimenti tiun, kiu foriras.

COS. — (Mi ekdubas ke vere iu demono lin parolas.)

FIL. — Kaj jes ja, ke vi ne scias respondi?

COS. — Mi sincere respondos ke se eĉ mi estus veninta por plenumi ceremoniaĵon al via gasto, mi ne meritus esti riproĉata.

FIL. — Riproĉata? Laŭdata, aplaŭdata. La ceremoniaĵojn oni ne devas formeti; multe pli, cetere, kiam la ceremoniemo estas vigligata de iom da sentemo.

COS. — Vi estas ema ridi tiun ĉi matenon.

FIL. — Kaj vi, ŝajne, estus ema plori; sed jes ja, ke mi gajigos en vi la humoron?

COS. — Ĉu vere?

FIL. — Ja, certe.

COS. — Kaj kiel?

FIL. — Per du vortoj.

COS. — Kaj kiaj estas la du belaj vortoj?

FIL. — Ilin aŭdu. Venu apuden, alproksimiĝu. La leŭtenanto ne foriras plu. Ha, kion vi diras? Ĉu vi ne sentas ekbrili la koron ĉe tiu ĉi anonco neatendita?

COS. — Pro komplezo, sinjoro Filiberto, ĉu vi min opinias enamiĝinta?

FIL. — Diru ke ne, se vi povas.

COS. — Sinjoro ne, mi ĝin diris.

FIL. — Ĝin ĵuru.

COS. — Ho, oni ne ĵuras pro tia bagatelo.

FIL. — Vi volas kaŝi al mi la veron. Kvazaŭ mi ne povus utili al vi, kaj ne estus kapabla konsoli vin, kaj konsoli tiun kompatindan doloranton.

COS. — Doloranto pro kiu?

FIL. — Pro vi.

COS. — Pro mi?

FIL. — Ho jes, ja vere ni estas en mallumo! Kion, oni ne vidas klare la amon kiun li sentas al vi? Kion, oni ne scias certe, ke li volas foriri pro malespero?

COS. — Malespero de kio?

FIL. — Pro via patro, kiu ne konsentas vin doni al li pro fiereco, pro avareco. He, filino mia, oni scias ĉion.

COS. — Vi scias pli ol mi, laŭ mi aŭdas.

FIL. — Vi scias kaj ne volas scii. Mi kompatas la honestan hontemon; sed kiam homo je mia karaktero sin proponas al via utilo, vi devas lasi la honton kaj malfermi la koron libere.

COS. — Mi restas tiagrade surprizita, ke vortojn mi ne trovas.

FIL. — Ni konkludu la interparolon. Diru al mi la veron, kiel povas diri tia honesta junino, kia vi estas; ĉu vi amas sinjoron de la Coterie?

COS. — Vi tiel min devigas, ke mi ne povas ĝin nei.

FIL. — Estu dankata la ĉielo! (He, mia filino ne kapablas mensogi.) Kaj li, ĉu amas vin per egala sento?

COS. — Ĉi tion mi ja ne scias, sinjoro.

FIL. — Se ĝin ne scias vi, ĝin al vi diros mi mem: li vin amas ĝis perdiĝo.

COS. — (Ĉu eble ke mi neniam tion rimarkis?)

FIL. — Kaj mi prenis sur min la taskon konvinki vian patron.

COS. — Sed mia patro, ĉu konas ke mi amas tiun ĉi ofi-
cion?

FIL. — Li devas ĝin koni tute certe.

COS. — Al mi li pridiris neniun vorton.

FIL. — Ho ja, via patro venos dialogi kun vi pri tia temo!

COS. — Li lasas min veni ĉi tien libere.

FIL. — Li scias ke vi venas en hejmon honoratan. Li ne povas timi ke oni lasos al vi pligrandan liberon ol tiun, kiu al honesta knabino konvenas. Resume, se mi enmiksiĝos en la afero, ĉu vi estos kontenta?

COS. — Justa ĉielo! Tre kontenta.

FIL. — Brave! Jen kiel mi ŝatas; la veron oni ne devas kaŝi; kaj cetere, al kio utilis nei per la lipoj tion, kion elmontras viaj pupiloj? Oni vidas sur via vizaĝo la fajron kiu brulruĝigas vian koron.

COS. — Vi havas vidon tre penetrema.

FIL. — Ho! Jen ĉi tie la oficiro.

COS. — Laŭ via permeso, sinjoro.

FIL. — Kien vi iras?

COS. — Ĉe fraŭlinon Giannina.

FIL. — Restu ĉi tie, se vi volas.

COS. — Ho! mi ne restos, sinjoro; min kompatu. Mi estas je via servo. (Mi perdis la prudenton. Mi ne scias en kia mondo mi estas.) (*ŝi foriras*).

SCENO OKA

(*SINJORO FILIBERTO, poste SINJORO DE LA COTERIE*).

FIL. — Estas ja ĉarmaj ĉi tiuj knabinoj! Ili prezentas ian alternadon de kuraĝo kaj honto, ke estas plezuro ilin aŭskulti. Jen la pasiulo. Se mi sukcesos lin konsoli, li havos ŝuldon al mia filino.

COT. — Sinjoro, oni min diris ke vi min deziras.

FIL. — Ĉu vi vidis fraŭlinon Giannina?

COT. — Mi ŝin ne vidis.

FIL. — Sed mi ne volus vidi vin tiel melankolia.

COT. — Kiam mankas la sano oni ne povas senti gajecon.

FIL. — Vi do ne scias ke mi estas kuracisto, kaj havas la kapablon vin resanigi?

COT. — Mi neniam sciis ke inter viaj virtoj vi posedas ankaŭ ĉi tiun.

FIL. — He, amiko, virto foje estas kie malplej oni supozas.

COT. — Sed kial ĝis nun vi ne klopodis por mia resanigo?

FIL. — Ĉar antaŭe mi ne konis la specon de via malsano.

COT. — Kaj nun, ĉu vi opinias ĝin koni?

FIL. — Jes, certe, perfekte.

COT. — Sinjoro, se vi estas instruita pri la kuracista arto, vi certe scias pli bone ol mi kiel ĝi estas malcerta, kaj kiel eraremaj estas la konjektoj kiuj alkondukas dedukti la kaŭzon de l' malsano.

FIL. — La diagnozo kiun mi formis pri via malsano havas tian fundamenton, ke mi estas tute certa ne erari, kaj se vi nur bonvolos fidi mian amikecon, mallonga tempo pasos ĝis via konsolo.

COT. — Kaj kiel vi intencus min kuraci?

FIL. — Mia unua recepto estas tute forlasi dum la momento ĉian projekton pri foriro, kaj profiti ĉi tiun aeron, kiu povas esti por vi resaniga.

COT. — Tute male, sinjoro, mi dubas ke ĉi tiu aero estas al mi tre, tre malutila.

FIL. — Ĉu scias vi ke ankaŭ de l' cikuto oni eltiras sanigajn medikamentojn?

COT. — Mi konas ĉi tiun novan eltrovon. Sed la komparo estas iom metafizika.

FIL. — Ne amiko, vi vidos ke, koncerne la aeron de tiu ĉi loko, ni estas en la sama situacio. Ni parolu sen metaforo. Vian malsanon kaŭzas pasio; forkuri de ĝi ŝajnas al vi kuraco, kaj estas malesperaĵo. Ĉie vi kunportus dornon en koro; se vi volas resaniĝi vere, necesas ke tiu sama mano kiu vin pikis, retiru la dornon.

COT. — Sinjoro, tia parolado min surprizas.

FIL. — Ne ŝajnigu kun mi nekomprenon. Vi nun parolas kun amiko kiu vin amas kaj interesiĝas pri via bono, kvazaŭ vi estus lia filo. Konsideru ke de via ŝajnigo eble dependos la forĵeto de via sano. Krom la amo kiun naskigis en mi la konstato pri via merito, kaj la kutimo de via kunestado dum pluraj monatoj, restas en mi la ĉagreno ke en mia hejmo via koro ekmalsanis, kaj ĉio forte min instigas kaj devigas vin resanigi.

COT. — Kara amiko, kaj de kio vi konjektis la fonton de mia ĉagreno?

FIL. — Ĉu vi volas ke mi diru la veron? Ĉion klarigis al mi mia filino.

COT. — Ho, ĉielo! Ŝi mem kuraĝis ĝin diri?

FIL. — Jes, certe. Ŝi min devigis iom insisti, poste ŝi ĝin diris.

COT. — Ha! Pro la amo per kiu vi bonvolas min honori, kompatu mian pasion.

FIL. — Mi vin kompatas. Mi konas tiom kiom vi la homan malforton kaj la perforton de amo.

COT. — Mi scias, ke mi ne devis nutradi tian fajron ne ĝin konigante al via kara amikeco.

FIL. — Pri tio ĝuste mi nur plendas. Vi ne montris al mi tiun lojalan konfidon kiun mi supozis meriti.

COT. — Mankis al mi la kuraĝo.

FIL. — Ho, bone, dank'al ĉielo ni ne malfruis por la solvo. Mi scias ke la knabino vin amas; ĝin konfesis al mi ŝi mem.

COT. — Kaj kion diras vi, sinjoro?

FIL. — Mi diras ke tia geedziĝo ne min malplaĉas.

COT. — Vi min konsolas ekstreme.

FIL. — Vi vidas ke mi estas tiu lerta kuracisto kapabla elkoni la malsanon kaj trovi por vi la rimedon?

COT. — Mi ne kapablis min konvinki pri tia granda feliĉo.

FIL. — Kaj kial?

COT. — Mi opiniis nesuperebla barilo la malgrandecon de mia havaĵo.

FIL. — Via sango kaj via merito povas egalvalori riĉan doton.

COT. — Vi montras al mi nekompareblan bonvolon.

FIL. — Mia amo ankoraŭ nenion faris por vi. Nun mi prenas la taskon krei vian feliĉon.

COT. — Tio povas dependi nur de via bona koro.

FIL. — Necesas pristudi la manieron superi la malfacilaĵojn.

COT. — Kaj kiaj estas ili, sinjoro?

FIL. — La konvenoj de l' patro de la knabino.

COT. — Amiko, mi ne volus ke vi vin amuzu pri mi. De la maniero laŭ kiu vi paroladis kun mi ĝis nun, mi kredis ĉiun malfacilaĵon superita.

FIL. — Mi ankoraŭ ne parolis kun li.

COT. — Al kiu vi ne parolis?

FIL. — Al la patro de la knabino.

COT. — Ho ĉieloj! Kaj kiu estas la patro de la knabino?

FIL. — Ho bele! ĉu vi lin ne konas? Ĉu vi ne scias ke la patro de fraŭlino Costanza estas tiu fiera, malafabla sinjoro Riccardo, kiu riĉiĝis per la financoj, kaj konas neniun idolon krom la profito?

COT. — (Mi perdas la prudenton. Falegis mia espero.)

FIL. — Riccardo ne venas ĉe nin. Vi malmulte eliras el hejmo, kaj ne estas strange ke vi lin ne konas.

COT. — (Ha! mi estas devigata kaŝi mian senton por ne divenigi neoportune mian fajron.)

FIL. — Sed kiel vi supozas ke la patro ne konsentos doni al vi sian filinon, se vi lin eĉ ne konas?

COT. — Mi havas motivojn lin kredi al tio kontraŭa, kaj pro tio mia malespero estas senrimeda.

FIL. — Ĉu mi ne estas via kuracisto?

COT. — Estos neutilaj viaj zorgoj.

FIL. — Lasu min agi. Nun mi iras trovi sinjoron Riccardo, kaj mi esperas.....

COT. — Ne sinjoro, haltu.

FIL. — Mi ne volus ke la konsolo vin delirigu. Antaŭ momento vi aspektis al mi tute gaja. De kio naskiĝas nun tia ŝanĝo?

COT. — Mi estas certa ke mi devos havi malbonan ŝancon.

FIL. — Tia malbravaĵo estas malinda je vi, kaj estus malinda je mi.

COT. — Ne risku pligrandigi mian malfeliĉon!

FIL. — Ĉu vi timas ke la patro insistos? Lasu ke mi faru la provon.

COT. — Ne, certe, miaflanke mi malaprobas.

FIL. — Kaj mi, miaflanke, volas ĝin fari.

COT. — Mi foriros el Hago; mi foriros surmomente.

FIL. — Vi ne agos al mi tiel malĝentile.

SCENO NAŬA

(*FRAŬLINO GIANNINA kaj la diritaj*).

GIA. — Kion signifas, miaj sinjoroj, ĉi tiu disputado?

FIL. — Sinjoro de la Coterie agas al mi per sendankemo kiun mi ne meritas.

GIA. — Ĉu eble, ke li estas je tio kapabla?

COT. — Ha! fraŭlino, mi estas kompatinda malfeliĉulo.

FIL. — Mi preskaŭ ekdirus ke li mem ne scias kion li volas. Li konfesas sian pasion, sin rekomendas al mia helpo, kaj, kiam mi min proponas por havigi al li fraŭlinon Costanza, li ekfuriozas kaj minacas foriri.

GIA. — Mi miras ke sinjoro leŭtenanto ankoraŭ parolas pri foriro.

COT. — (*al Giannina, ironie*) Ĉu vi konsilus min resti, dank' al tiel bela espero?

GIA. — Vi devas resti dank'al tiu kiu vin amas. Laŭ permeso de mia patro, aŭdu kion ĵus diris al mi pri vi fraŭlino Costanza.